# JAN WERNER

Arkitekturo en diversaj epokoj.

Hodiaŭ mi volas trairi historion de arkitekturo. Vere, tio estas malfacila tasko, ĉar la temo estas ege ampleksa. Sed mi ne intencas paroli detale kaj plenigi vian kapon per diversaj nomoj, terminoj kaj jarindikoj. Tio ebligos prezenti al vi kontinuan billdon de tio, kion homoj nomas arkitekturo.

Post ĉi tiuj antaŭvortoj mi volonte eksplikus al vi kio arkitekturo verdire estas. Al vi ŝajnas, ke tio estas tre simpla, sed nur ŝajnas, ĉar vi ne scias, ke nenies definicio kontentigas fakulojn.

Prof. T. Masaryk diris, ke arkitekturo estas esprimo de spirito de la tempo. Tio estas ĝusta, eĉ genia eldiro, sed nekompleta, ĉar ankaŭ ceteraj artoj estas esprimoj de spirito de la tempo.

Unu franca arkitekto esprimis sin, ke arkitekturo estas tio, kio faras ruinojn belaj. Jes, greka templo estis bela dum malnova greka gloro kaj bela ĝi estas ankaŭ nun, kiam restis nuraj ruinoj. Ĉi tiun opinion ni ne povas apliki ĉe hodiaŭaj konstruaĵoj, ĉar en ruinoj de hodiaŭa urbo ni trovos tute nenion belan kaj ravan, sed nur terurajn ruinojn, brikojn kaj ŝtonojn, feron kaj ferbetonon. Tia estas urbo post bomb-atako.

Soveta arkitekto Miĥajlov diris: "Arkitekturo estas arto konstrui domojn kaj kompleksojn por vivaj kaj idea-artaj bezonoj de homa socio".

Simila estas eldiro de soveta arkitekto Mordvinov: "Arkitekturo estas arto konstrui belajn kaj komfortajn domojn kaj urbojn." En ĉi-frazoj estas sufiĉe da vero, sed tamen ne kontentigas, ĉar forlasas historian signifon de arkitekturo kaj ofte direrencas de praktiko.

Do kio estas arkitekturo?

Arkitekturo estas reflekso de socia konscio, ĝi ne estas nura teknika kreaĵo, ĝi ankaŭ ne estas nur kreaĵo arta kiel ekzemple muziko aŭ pentrista arto.

Ĉar arkitekturo estas tio, kio staras, neniam nur fantaziaj proponoj sur papero, estas kompreneble, ke arkitekturaĵo ne estas farita de unuopulo, kiel okazas en artoj muzika, pentrista aŭ poeta. Arkitekto estas aŭtoro de imago, ideo, plano estas farita iam de aŭtoro, ofte de eta kolektivo. Sed kiam estas arkitektura verko pripensata en detaloj kaj teknikaj problemoj, kiam ĝi estas realigata, tiam prilaboras ĝin multaj homoj. Sed aŭtoro garantias tion, kio eliris lian kapon, ĉar ne temas jam pri papero, pri perdita tempo, sed ankaŭ pri grandaj mon-elspezoj.

Arkitekturo el ĉiuj artoj pleje influas homon. Ĝi estas konkreta medio por homa vivo. Nenio influas tiel forte kaj senĉese, kiel konstruaĵoj. En tio estas ankaŭ nacia senco de arkitekturo, kiu kreas en ni senton de nia hejmo, de nia patrujo, precipe dum restado eksterlanda. Kio pli vidigas nian patrujon kaj ĝian historion ol Praha en sia arkitekturo. — Iu diris, ke arkitekturo kiel muziko en ŝtono sonas per jarcentoj kaj kreas en homoj de pluaj generacioj profundajn estetikajn sentojn. /Mordvinov/

Historio de arkitekturo komenciĝas jam en tempo antaŭhistoria. Siajn specialaĵojn havas epoko ŝtona, bronza kaj ankaŭ fera. Entute iliaj arkitek-turoj estas primitivaj.

Necesas pli amplekse mencii arkitekturon de malnova Egipto. De primitivaj komencoj en praepoko al altaj valoraĵoj en tempo historia iris egipta kulturo, kies

riĉaj memoraĵoj restis konzervitaj ĝis hodiaŭa tempo.

Egipta kulturo evoluiĝis dum 4 jarmiloj antaŭ Kristo. Vi scias, kio estas plej karakteriza por Egipto. Piramidoj! Jes. Kaj kiel egiptaj faraonoj alvenis al la ideo konstrui piramidojn? Originaj pratempaj tomboj estis anstataŭataj per prismaj mastaboj. Faraonoj de malnova imperio konstruis mastabojn pli kaj pli grandaj, pli monumentaj. Formo de kripto – mastabo post tempo ŝanĝis sin al ŝtupoforma piramido, kaj fine konstantiĝis simpligita je kvarflanka piramido. Konstrui al si piramidon kaj ĉe ĝi templon estis celo de la vivo de ĉiu faraono. – Konstruo de piramidoj estis tre altkosta, tial post iu tempo faraonoj forlasadis la kutimon kaj nur kiel motivo piramido vidiĝis sur tombaj arkitekturoj.

Rokaj tomboj estas artefaritaj grotoj enskulptitaj en montaj sinoj. Eniron ekstere indikas grava pilastra arkitekturo. Pilastro ĝenerale estis grava elemento ĉe konstruo de temploj kaj palacoj, nome ankaŭ ĉe kulturoj pli malfruaj.

El egipta riĉeco profitis Eŭropo dum longaj tempoj. El Egipto estis forveturigataj multegaj memoraĵoj, monumentoj, reliefoj, sarkofagoj kaj etaj kreaĵoj, per kiuj pleniĝis muzeoj de ĉiuj grandaj urboj de Eŭropo. Eĉ tutaj obeliskoj estis tie prenitaj kaj starigitaj sur placoj de Romo, Istambulo, Londono, Parizo, Nova Jorko. Egipto restas plu celo de arkeologoj kaj arkitektoj.

La dua lulilo de klereco estis delonge malaltaĵo mezopotama, grasigata de riveroj Eŭfrato kaj Tigrido. Krom konstruaĵoj inĝenieraj, precipe akvo-bariloj, kanaloj kaj diversaj akvujoj necesaj por florado de agrikulturo, ekzistis tie belegaj konstruaĵoj arkitekturaj. Altaj templaj turoj kiel ŝtupformaj piramidoj nomiĝis zikuratoj. Tia zikurato de unu el multnombraj babilonaj temploj estis konata biblia "Babilona turo". Bedaŭrinde el babilonaj konstruaĵoj restis nur grandaj amasoj da ruinoj, ĉar estis konstruitaj el argilo kaj argilaj brikoj. Ŝtono en tiu regiono ne estis. Mondkonataj pendantaj ĝardenoj de Semiramida estis kalkulataj al 7 mirindaĵoj de la mondo. Ili estis ornamaj ĝardenoj ĉe babilona reĝa palaco, fonditaj alte super polvaj stratoj de la urbo sur etaĝa sistemo de la pilastroj, ligitaj per volbo.

Asiraj kaj babilonaj urboj estis laŭdire dum batalo ne akireblaj pro grandegaj kaj fortaj muregoj. Sed – malgraŭ tio mezopotama kulturo falis. Iam riĉa lando estas nun mizera, iuloke senviva kaj multaj nekonataj memoraĵoj ankoraŭ atendas sub surŝutitaj tavoloj homon, kiu malkovrus ilin.

En la dua jarmilo antaŭ Kr. Hetitoj[1] en Malgranda Azio kaj Sirio estis ia kultura ponto, kapabla transporti artajn formojn. Ĉeĥa sciencisto, prof. Bedřich Hrozný, kiu antaŭ nelonge mortis, havas grandan meriton pri esploro de hetita kulturo. Restintaj memoraĵoj estas plej ofte lokoj por mortintoj.

Tombaj monumentoj nomitaj tumulusoj aranĝitaj kiel konusoj havis grandajn distancojn kaj kelkaj konkursas per sia grandeco kun egiptaj piramidoj.

Malnova kultura centro de meza Oriento estis ankaŭ Palestino, kiu kelkajn jarcentojn antaŭ Kr. estis patruĵo de multaj semidaj gentoj, el kiuj la plej protagonistaj estis Judoj. Laŭ arkitekturaj kaj skulpturaj kreaĵoj ni konstatas fremdajn influojn de fortaj najbaraj imperioj.

Kaj nun ni iru iom pli oriente, en Persion.

1 Laŭ PIV nun hititoj (rim M. Malovec)

Persa arto estas multe pli nova. Persoj sin prezentas en historio kiel fortaj mondregantoj nur post okupo de Babilono en 6-a jarcento a.Kr. Sed la tempo de rapida ekfloro finiĝas, kiam persa imperio estis venkita de Aleksandro la Granda. Persoj tre uzis spertojn, kiujn ili gajnis en okupitaj landoj kaj vere ili scipovis ilin bone eluzi en arkitektura arto. Persoj konstruis altkostajn palacojn por potencaj imperiestroj. Tia palaco estas komplekso de konstruaĵoj loĝaj kaj reprezentaj. Gravaj palacaj konstruaĵoj estis belegaj kolonaj salonegoj de flankoj malfermitaj. Tie okazadis kortegaj festoj, tie imperiestro akceptadis delegitojn kaj disdonadis diversajn rangojn. Persa arto, subtenata nur de imperiestroj, perdis ĉi-apogon post venka eniro de Grekoj, disvastigantaj orienten la kulturon klasikan. Nur en 3-a ĝis 6-a jarcentoj persa arto denove reviviĝis.

Indio.[2] Tiu riĉa kaj tre dense loĝatigita lando, plena de akraj diferencoj klimataj kaj klasaj, sidejo de nombregaj sektoj, potenca pastraro, iras dum tempoj kaj epokoj laŭ vojo de origina evoluo. Ĉirkaŭ jaro 2500 a.Kr. popolo versimile indoeŭropa loĝas en impone belaj urboj, konstruas palacojn, belajn domojn, publikajn banejojn kaj grenejojn. Per invado de sovaĝaj gentoj estis ĉi tiu alta kulturo por iu tempo detruita.

Ĉinio. Ankaŭ tiu lando estis delonge centro de la kulturo. Ĝi evoluigis memstare kaj influis grandan parton de orienta Azio. En konstruado oni uzas grandparte brikojn kaj lignon, tial savitaj konstruaĵoj estas relative ne tre malnovaj. Ĉe konstruaĵoj grandaj kaj malgrandaj, publikaj kaj ankaŭ privataj ofte vidiĝas karakteriza motivo: tegmento kun supren levitaj randpintoj. Tio memorigas al ni tendon aŭ pagodon. Sur ĉinaj konstruaĵoj estas riĉa precipe kolorito. Super ceteraj elstaras unu el la mirindaĵoj de la mondo, 3.000 km longa defenda muro, konata kiel "Ĉina muro". Ĝi estis brikoj kaj ŝtono por defendi kontraŭ rabaj invadoj ĉe mongola limo. Ĝi serpentumas trans montojn kaj valojn, havas multajn turojn kaj pordegojn. Vere io grandioza.

Imperio de leviĝanta suno, Japanio, en 6-a jarcento ricevis fortajn kulturajn impulsojn el Ĉinio. Portanto de pli alta klereco kaj arkitektura arto, skiklptura kaj pentrista arto, estis budaismo, disvastiĝinta de kontinento al japanaj insuloj. Japana artisto, entuziasmigita per amo al naturo, havas delikatan senton por kreado. Li scias bonege harmoniigi arkitekturon kun regiono kaj influi rigardanton per tuta efekto, eleganta detalo kaj harmonia kolorito.

Interesa kaj origina estas japana loĝa domo – ligna malpeza konstruaĵo, kia pleje taŭgas por regionoj de ofta tertremado kaj pluva klimato. Plana amplekso de ĉiuj ĉambroj de loĝa domo indikas kaj mezuras sin per nombro de matoj, kiuj havas norman mezuron 91 x 182 cm. Nia peza meblaro estas por japano fremda.

Kaj nun ni transiru por kelkaj vortoj en Amerikon, ĉar ankaŭ ĉi tie ekzistas malnovaj kulturoj. Kulturo de amerikaj nacioj evoluiĝis ĝis la 16-a jarcento malrapide kaj memstare, same kiel kulturo de nacioj de malnova mondo, kaj iliaj arkitekturaj memoraĵoj, pentrista kaj skulptura artoj direktiĝas per similaj fundamentaj ideoj, per similaj konstruoj kaj detaloj.

En meza Ameriko tre floris landoj loĝataj de Toltekoj, pli malfrue de Aztekoj en hodiaŭa Meksiko, en Jukatanio loĝis Majoj. Inkoj, estintaj loĝantoj de Peruo kaj Ĉilio, fondis sian bonege organizitan imperion sur restaĵoj de malnova kulturo de nekonata nacio.

2 Nun laŭ PIV: Hindio, hindeŭropa (rim. M. Malovec)

Plua evoluo estis rompita per ruinigo de imperioj farita de eŭropaj trovintoj.

Nun ni transiru al regionoj pli proksimaj, en Eŭropon. Grekan arton antaŭas granda kulturo de indoeŭropa nacio, ĝis nun nekonata laŭ nomo, kiu loĝis insulojn kaj bordojn de Egea Maro. Ĝi tenis fortajn rilatojn kun ceteraj regionoj de Mediteraneo. Ĉi tiu kulturo komenciĝis per primitivaj formoj en ŝtona epoko, en la 3-a miljaro ĝi ege evoluiĝis kuj kulminis en la 2-a, en bronza epoko. Post longaj tempoj ni ne konis ĝin. Nekonataj, disfaliĝantaj arkitekturaj memoraĵoj de negreka deveno instigis, ke ni serĉu mankantan ĉapitron de la historio. Germana esploranto Schliemann sukcesis fine de 19-a jarcento malkovri en monteto Hisarbyk ĉe nord-okcidenta marbordo de Malgranda Azio restaĵojn de kastelo Troja. 9 tavoloj de malaperinta urbkastelo, konservitaj tie, rakontas, kiel de la 3-a miljaro a.Kr. estis urbo sinsekve rekonstruita kaj pligrandigita. Riĉa urbo de la 6-a tavolo estas glora urbo Troja de Homer. Insulo Kreta estis dum longaj centjaroj centro de egea klereco kaj arto.

Kretaj urboj ne bezonis muregojn, ĉar forta ŝiparo defendis sufiĉe insulon. Reĝaj palacoj en Knossu kaj Faistu estis ampleksaj aroj de malaltaj domoj, situantaj ĉirkaŭ grandaj kaj malgrandaj kortoj. Reprezentaj salonegoj, ĉambroj kaj provizejoj ligis galerioj, ŝtuparoj, koridoroj kaj terasoj. En palacoj estis aranĝitaj banejoj, kanalizo kaj akvokondukilo. Muroj estis konstruataj el sekaj brikoj kaj ligno, nur io estis el ŝtono. Interna aranĝo pruvas belguston kaj riĉecon de kreaj ideoj. Temploj ne estas, al dioj oni oferis en naturo, tomboj estas el arkitektura vidpunkto malriĉaj.

Kreta kulturo malfortiĝas de 14-a centjaro a.Kr. kaj arta matureco translokiĝas al kontinento. Tie, en malnovaj urboj sur marbordo de Peloponezo kaj ankaŭ en meza Grekujo, konstruas regantoj fortegajn kastelojn, por ke ili defendu regionon kontraŭ grekaj gentoj alvenantaj de nordo. Multaj kasteloj de egea deveno estis loĝataj ankoraŭ en historia tempo greka, ankaŭ multaj malaperis kaj ekzistis plu sole en popolaj fabeloj.

Kiel interesaĵon mi mencias priskribon de tia kastelo. Ĝi konsistis el parto subkastela kaj el palacaj konstruaĵoj situantaj pli alte kaj ĉirkaŭitaj per dikaj muregoj. En la plej dikaj muroj estas kameroj kaj koridoraj provizeĵoj. Voĵo iras pro strategiaj kialoj de maldekstra flanko tra pordego al monumenta kolona propileo kaj finiĝas per korto. Tra simila iom pli eta pordego oni iras plu en la korton, ĉirkaŭita de kolonado. Tie estis ofer-altaro kaj teretaĝaj domoj. Per duobla antaŭĉambro oni eniris en ĉefan salonegon, t..n. megaronon. Ĝi estis salono por viroj. Fumo de meze situanta fajrejo foriĝis tra ia truo en ligna plafono, kiu estis apogata per kolonoj. Lignaj kolonoj estis mallarĝigitaj de kapitelo al piedestalo kaj garnitaj per ora kaj bronza lado. Per aranĝo similas al megarono salono por virinoj. Al ĉefaj ejoj apartenas banĉambro, kelkaj dormoĉambroj, laborejoj, kuirejoj kaj a.

Egea kulturo antaŭ Grekoj retretis. Penetrado de grekaj gentoj de nordo komenciĝis eble en la Jnro 1600 a.Kr. kaj daŭris kelkajn jarcentojn. Egea kulturo falis, en animoj de simplaj okupantoj ne estis por ĝi komprenemo. Sed sur ruinoj de la malaperanta klereco grekoj elkonstruis propran novan kulturon.

Studante grekan arton ni konstatas, ke ĝi estas el ĉiuj al ni plej proksima, plej bone komprenebla, klara. Ni diras, ke ĝi estas klasika, tio signifas modela, perfekta.

Artisto en ĝi influas nek per konsterna potenco propra al Egipto, nek per brilblindiga lukso de Asirio aŭ Persio, sed per klaraj, originaj kaj hele harmoniigitaj

formoj, per kiuj estas ideo materie esprimita.

Greka artisto-arkitekto evoluiĝis ĉiuflanke, rilatis kun ceteraj elementoj de hejma kulturo: poezio, muziko, scienco. Lia arto estas nacia, popolo, ĝi servas al popolo, ĝi ne bazigas en manoj de despotaj regantoj, ne estas ligita per iliaj kapricoj.

Libera ŝtatformo republikana estis bazo por greka kulturo.

En tempo de mil jaroj antaŭ Kr. 3 ĉefaj gentoj de greka nacio, t.e. Doroj, Jonoj kaj Aioloj havis definitivajn sidejojn.

Doroj okupis orientan kaj sudan parton de Peloponezo, insulon Kreta kaj kelkajn lokojn en Sicilio kaj suda Italio. Oni priskribas ilin kiel popolo de serioza kaj severa karaktero havanta sencon por milit-arto kaj ŝtata ordo, edukanta junularon al vera sindeteno. Ĉi tiuj emoj vidiĝas plene ankaŭ en arkitektura stilo, kiu estas nomata stilo dora. En ĉi-stilo oni uzas simplajn kolonojn sen piedestalo, kolontrunko estas kanelita, kapitelo konsistas el rondplato nomata eĥino kaj kvarflanka abako. Pri detaloj de arkitravo, friso kaj kornico mi ne parolos, ĉar mi devus uzi multajn terminojn.

Jonoj estas la dua branĉo. Sian potencon ili disvastigis al insuloj de Egea maro kaj al bordoj Malgranda Azio. Ili estas vera malo de Doroj, ĉar ili signiĝas per naturo pli libera, pli vervoplena kaj per emo al brilego. Ilia granda arta talento estas videbla sur arkitekturaĵoj de jona stilo. Ankaŭ por ĉi tiu stilo estas karakterizaj kolonoj. Eble vi povos imagi ilin, se mi diros, ke ĉefa parto de jona kapitelo estas trifoje kunvolvita voluto. Certe vi jam vidis tian kolonon ĉe iu renesanca konstruaĵo.

Aioloj, loĝantaj en ceteraj partoj de Grekujo ne havas specialan stilon.

Korinta stilo evoluiĝis memstare apud menciitaj du stiloj. Kapitelo de korinta kolono similas al ronda korbo, el kiu elkreskas en unu aŭ du vicoj akaciaj folioj. Korinta stilo estas la plej luksa kaj la plej bela. Ĝi kulminas nur en roma imperio.

Grekaj arkitekturaĵoj estas ege multnombraj. Grekoj konstruis precipe religiajn konstruaĵojn, nome templojn, sed eĉ ne unu restis sen difekto. Kelkaj estis detruitaj dum militoj, ceteraj dum tertremadoj kaj inundoj. Unu el la plej konataj konstruaĵoj estas atena "Akropolis", kaj en ĝi precipe templo de diino Atenea – Partenon. Partenon servis al grekaj dioj, poste al kristina Disinjoro. En tempo de turka regado estis tie magazeno de pulvo, kiu eksplodis dum sieĝo de Akropolis en 17 jarcento. Tiam estis tute disĵetita meza parto kaj kultura mondo estis malriĉigita pri la plej bela kreaĵo de greka arkitektura arto.

Sed ankaŭ civilaj konstruaĵoj fieras per riĉa arkitekturo. Kolona salono nomata "stoa" mankis en neniu iom pli grava urbo. Ĝi estis ejo, kie okazadis publikaj prelegoj, kie oni deklamis kaj promenadis. En multaj urboj estis naturaj amfiteatroj, odeionoj estis destinitaj por lirikaj prezentadoj kaj muziko, grandaj longformaj arenoj por homoj estis stadionoj, se ili estis destinitaj por ĉeval-kuradoj, tiam hbavis nomon hipodromo.

Junularo estis klerigata en sciencoj kaj gimnastiko en ĉambroj kaj gimnaitikejoj de gimnazioj.

Turo de vento en Ateno, ia speco de akva kaj suna horloĝo, estis nomata "Horologium".

Ĉefaj ejoj de greka loĝa domo estas en suda direkto, laŭ moderna maniero.

Grekaj arkitektoj direktiĝis ankaŭ per disponaj principoj de urbanismo, konstruis

belegajn kompleksojn. Vere, estas mirinda la greka arkitekturo, sed ĝia gloro ne daŭris eterne. Kulmino de greka gloro pasis. Helena tempo finiĝas per falo de greka arto.

Grekaj artistoj, arkitektoj, skulptistoj, pentristoj, sciencistoj kaj la ceteraj transloĝigis al regionoj kun pli favoraj kondiĉoj, precipe al Romo kaj roma imperio, kiu okupis ilian patrujon. Greka arto alkonformiĝis sur nova tero al novaj taskoj, ligiĝas kun hejma kulturo kaj tiel kreas arton novan – la roman.

Roma arkitekturo transprenas ankaŭ ion de Etruskoj, kiuj elkonstruis sian kulturon en meza Italio. Dum evoluo de Roma imperio ilia potenco malaperis.

Agresiva naturo de Romanoj kaj ilia praktika spirito donas direkton al plastika arto, kiu bazas sur etruska utildona arkitekturo. Nur per influo de grekaj ideoj, ricevas ilia arto iom idealan nuancon.

Sed tamen romaj artistoj ne estas nuraj similigantoj. Atinginte ian nivelon, ili forŝovas elpruntitajn modelojn kaj kreas per propra manieroellaboraĵojn en tuto kaj detalo perfektajn. Tiel aperas stilo, kiun ni nomas la roma.

Celo de roma konstruado estis utilaj konstruaĵoj, kiuj vekas miron per sia grandeco kaj laŭcela aranĝo de interno. Ilia brilo kulminas en tempo de imperiestroj, poste malprogresas.

Romanoj transprenis kolonajn sistemojn de Grekoj. Ili ankaŭ uzis plibonigitan kolonan sistemon de Etruskoj – stilon toskanan.

Centro de ĉiu vivo estis Romo. Tion montras precipe arkitekturo. Temploj, bazilikoj, teatroj, forumoj, el kiu la plej malnova kaj plej konata "Forum Romanum" – Roma forumo. Arkitekturo de antikva Romo mem sufiĉus por kelkaj prelegoj, sed mi ne ĉerpos plu el tiu riĉa epoko.

Roma ŝtato fine elĉerpis siajn fortojn per interna ĥaoso. Per sama rapideco, per kia ekfloras nova kultura centro en Istambulo, falas la arto de Romo.

Fine de 5-a jarcento, post disfalo kaj divido de la Roma imperio, sur ĝiaj ruinoj organizas nordaj nacioj siajn ŝtatojn kaj konstruas sur heredita bazo novajn kulturojn, novan arton.

Per disfalo de Roma imperio finiĝas antikva epoko kaj kun ĝi ankaŭ unu el epokoj de arkitektura evoluo. Ĉi tiu tempo estas ia limdato ne nur ĝenerale historia, sed ankaŭ limŝtono en arkitekturo. Kulturoj, kiujn mi ĝis nun priskribis, ne estas ĉiuj sufiĉe konataj, tial mi dediĉis al ili multajn, sed tamen ege koncizajn vortojn.

Plua evoluo estas al vi pli proksima kaj pli konata. Multfoje vi jam aŭdis pri arkitekturaj stiloj romana, gotika, renesanca, pri baroka stilo ktp. Laŭ ĉi tiuj stiloj mi volas daŭrigi kaj fini hodiaŭan prelegon.

Komence de mezepoko el roma arkitekturo evoluiĝis nova stilo, kiu pli malfrue estis eknomata romana. Modelo por longformaj temploj romanaj estis baziliko, el kiu estis ellasita korto kun akvujo. Nova parto de preĝejaj konstruaĵoj friĝis turo. Komence en ĉi-stilo oni konstruis nur el ŝtono. Planimetriaj formoj estis kvadrato, ortangulo kaj rondo, stereometriaj poste kubo kaj globo, kiuj karakterizas simplecon de la tempo. Pli grandaj romanaj preĝejoj estas trinavaj kaj en loko de altaro ĉiuj navoj havas duonrondan absidon. Multaj romanaj preĝejoj havas sub presbiterio kripton, tial la presbiterio estas plialtigita.

Rotondoj kaj bazilikoj estis similaj al citadeloj kaj fortikaĵoj de kristana religio,

penetranta al regionoj de antikvo-slavaj religiaj ideoj. Duonronda arko ornamas etajn fenestrojn kaj portalojn. Turaj fenestroj estis dividitaj per kolonetoj. Kapitelo de romanaj kolonoj estas kuba, malsupre globforma. Rula kaj kruca volboj donas al konstruaĵoj karakteron de firmeco kaj forteco.

Ĉe ni en stilo romana oni konstruis de kristanaj komencoj ĝis la 13-a jarcento. Al la plej konataj memorindaĵoj de ĉi-stilo apartenas ĉe ni preĝejo de sankta Georgo en kastelo de Praha, de s-kta Venceslao en Stará Boleslav, poste preĝejoj en Řeznovice, Tismice, portalo en Třebíč, rotondoj en Praha, Znojmo kaj la aliaj.

En 12-a jarcento el stilo romana evoluiĝis en norda Francio nova stilo. Italoj nomis ĝin la gotika stilo laŭ Gotoj, kiuj iam invadis Italion. La nomo "gotika" tiam signifis, ke la stilo estas barbara.

Diference de la epoko romana, kristaneco en tempo gotika estas venka movado, kiu jam ne devas timi pro reakcio de antikvo-slava religio. Tial la preĝejoj ne havas plu fortikan karakteron. Per sia dominanta linio vertikala esprimas super-naturalisman karakteron de la tempo. Pintarko de grandegaj fenestroj kaj portaloj celas al ĉielo same kiel multaj turoj kaj finialoj de bravega apog-sistemo, portanta pezajn aŭdacajn volbojn, kies apartaj surfacoj estas tenataj per reto da ripoj, finitaj en teniloj, volbŝtonoj kaj konzoloj.

Koloraj bildoj sur fenestroj enlasas en preĝejan internon misteran duonlumon, konvenan por mistikaj kontemplacioj.

Pli malfrua stilo gotika ĉe ni estas nomata laŭ reĝo Vladislav la 2-a Jagelono.

En nia lando estas multaj gravaj gotikaj konstruaĵoj, ekzemple en Praha katedralo de s-kta Vito, la Tina preĝejo k.a., en Brno sur Petrov, kaj de sankta Jakubo, plu en Kutná Hora, Hradec Králové, Olomouc, Koŝice kaj en multaj aliaj lokoj. Estas konate, ke nian gotikan arkitekturon multe riĉigis imperiestro kaj reĝo, Karolo la 4-a.

En renesanca stilo, kiu unue aperis en Italio, denove revivis arkitektura arto de antikvaj grekoj kaj romanoj. Tion memorigas ankaŭ la nomo, kiu signifas "renaskiĝo" – el la franca.

Rnesancaj preĝejoj havas formon de granda halo ĉirkaŭita per kapeloj. Volbo estas kruca kaj estas sur kolonoj de malnovaj formoj aŭ sur pilastroj. Renesancaj preĝejoj havas ofte grandegan kupolon, finitan per tureto. Ĉefa fronto estas dividata per kolonoj aŭ duonkolonoj kaj kutime portas triangulan frontonon. Portaloj similas al majestaj pordegoj, flanke staras kolonoj portantaj ornaman entablementon.

Ĉi-stilon oni uzadis en 15-a kaj 16-a jarcentoj. La plej bela renesanca konstruaĵo estas preĝejo de sanktaj Petro kaj Paŭlo en Romo. En nia lando estas renesancaj memoraĵoj malmultaj.

Baroka stilo diferencas de la renesanca precipe en brileco de ornamaĵoj kaj en ofta uzado de kurbaj linioj. En la 17-a kaj 18-a jarcentoj, kiam en arkitekturo regas baroko, ankoraŭ la eklezio estas forta kaj havas gravan pozicion socian. Tial ankaŭ la baroka stilo vidiĝas precipe ĉe preĝejoj.

Sed venas tempo de iluminismo, kiam konstruas precie stato kaj nobelaro, malpli eklezio. Samtempe komencas konstrui riĉaj urbanoj, ni povas diri burĝaro. Por ĉi tiu tempo estas karakteriza M«. uomata empiro, kiu estas stilo de transiro.

Romantika gotiko kaj pseŭdogotiko, en kiu nobeloj rekonstuas siajn kastelojn kaj palacojn, estas falsa. Tuj post la empira periodo la burĝaro tute logike uzas kiel

modelo renesancajn elementojn. Ĉi tiu analogia stilo, renesancismo, estas ĉe ni multe uzata. Ĝi estas ĉefa stilo de nia nacia revivigo, kiu donis al ni Nacian teatron, Nacian muzeon kaj aron da diversaj konstruaĵoj.

Sed tekniko ne dormis, tekniko ege progresis kaj influis ankaŭ konstru-metodon. Aperis novaj materialoj, precipe betono kaj ferbetono. Arkitekturo de tiu ĉi nova tempo havas novan stilon; dume ni diras stilo moderna.

Ĉi-okaze necesas mencii renkontiĝon de du problemoj: stilo kaj konstruo. Dum fine de pasinta jarcento venkis ankoraŭ stilo, eĉ malgraŭ uzado de modernaj konstru-materialoj, en 20-a jarcento venkis konstruo kaj stilo tute akomodiĝis. Jes, ankaŭ aperis belaspektaj konstruaĵoj, eĉ mirinde belaj kaj en harmonio kun natura aŭ urba medio. Sed ankaŭ mi devas konfesi, ke multaj novaj konstruaĵoj estas malbele aspektaj, eĉ teruraj, kiel kestoj.

Estas arkitekto – artisto kaj arkitekto-konstruanto. Sed se ni volas konstrui belajn, komfortajn kaj ankaŭ malkarajn domojn, ni ne povas tute dividi arkitekturon al la branĉo arta kaj konstrua. Ni devas uzi kaj elĉerpi ambaŭ.

Nia arkitekto devas uzi ĉiujn teknikajn eltrovojn kaj ankaŭ respekti principojn artajn. Li devas krei nacian arkitekturon, per kiu ni kontribuas mondan kulturon kaj mondan arkitekturon. Ni ja kreas mond-kulturon kiel ĉeĥoj.

Jan Werner